# Informilo por Interlingvistoj


### 8-a jaro (tria serio) ISSN 1385-2191 n-ro 28 (1/1999)

Eldonata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo
(UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL- 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)



Redaktoro: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin; tel. +49-30-5412633; fax +49-30-5456742; e-mail: blanke.gil@berlin.snafu.de


---

## Enhavo


1 DLT: resuma raporto (Klaus Schubert)

2 Pri Universalaj Lingvoj de la 17-a jarcento en Anglio (Robert Stillmann)

3 Nova literaturo pri lingvo-politiko

3.1 La angla lingvo kiel tutmonda (David Crystal)
3.2 La germana — chu ankorau internacia lingvo de scienco ? (Ulrich Ammon)
3.3 Lingvo-politiko en/por Europo
3.3.1 Multlingveco — malbeno au beno por la homaro ? (Max Hans-Jürgen Mattusch)
3.3.2 Multlingva Europo: Defioj al la lingvo-politiko kaj lingvo-planado (Reiner Arntz)
3.3.3 La Europa Unio: Problemoj de la multlingveco — lingvoscienca perspektivo (Kerstin Loehr)

4 Habilitiga disertacio pri Esperanto

5 Volapuko ankorau ekzistas

6 Reapero de „Cosmoglotta" — revuo en Interlingue


IpI informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicajhoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo au kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankau publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn.

En chi tiu kajero vi trovos la enhavtabelojn de kelkaj tre interesaj lingvopolitikaj libroj, bedaurinde precipe germanlingvaj. Kompreneble ne nur en la germana oni verkas pri lingvopolitikaj temoj lige al la Europa Unio. Tiaj libroj ja ankau ekzistas en aliaj lingvoj. Bedaurinde la redaktoro ne estas sufiche informita pri similaj eldonajhoj en la angla, franca, itala k.s. Se li ricevos tiajn librojn, li same informos pri ili.

---

## 1 DLT: resuma raporto

Chi tiu raporto estas legebla aliloke en la paghoj de CED.

---

## 2 Pri Universalaj Lingvoj de la 17-a jarcento en Anglio

Chiam denove verkistoj estas fascinitaj de la projektoj de universala lingvo kaj la al lingvofilozofiaj konceptoj, al ili ligitaj.

Jen nova titolo:

- *Stillmann, Robert E.* (1996): The New Philosophy and Universal Languages in Seventeenth-Century England. Cranbury — London — Mississauga, Ontario: Associated University Press, ISBN 0-8387-5310-8, 359 p.

(Enhavtabelo ellasita.)

---

# 3 Nova literaturo pri lingvopolitiko

## 3.1 La angla lingvo kiel tutmonda

*Crystal, David* (1997): English as a global language. Cambridge: University Press, ISBN 0 521 59247 X (hb), 150 p.

(Enhavtabelo ellasita.)

## 3.2 La germana — chu ankorau internacia lingvo de scienco ?

*Ammon, Ulrich* (1998): Ist Deutsch noch internationale Wissenschaftssprache? Englisch auch für die Lehre an deutschen Hochschulen. Berlin - New York: Walter de Gruyter, 338 p., ISBN 3-11-016148-6.

(Enhavtabelo ellasita.)

## 3.3 Lingvo-politiko en/por Europo

### 3.3.1 Multlingveco - malbeno au beno por la homaro ?

*Mattusch, Max Hans-Jürgen* (1999): Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen für die Menschheit? Zu Fragen einer europäischen und globalen Fremdsprachenpolitik. Frankfurt/Main: Peter Lang, 321 p., ISBN 3-631-30587-7, prezo 89 DEM.

(Enhavtabelo ellasita.)

### 3.3.2 Multlingva Europo: Defioj al la lingvo-politiko kaj lingvo-planado

*Arntz, Reiner* (1998): Das vielsprachige Europa. Eine Herausforderung für Sprachpolitik und Sprachplanung. (Hildesheimer Universitätsschriften, Band 4). Hildesheim: Universitätsbibliothek, 188 p. ISBN 3-9805754-4-6.

(Enhavtabelo ellasita.)

### 3.3.3 La Europa Unio: Problemoj de la multlingveco — lingvoscienca perspektivo

*Loehr, Kerstin* (1997): Mehrsprachigkeitsprobleme in der Europäischen Union. Eine empirische und theoretische Analyse aus sprachwissenschaftlicher Perspektive. Frankfurt/ Main: Peter Lang, 190 p. ISBN 3-631-33031-6

Jen libro, kiu tu_as multajn lingvistikajn aspektojn de la lingvaj reguloj en Europa Unio kaj i.a. ties jurajn sekvojn.

(Enhavtabelo ellasita.)

---

# 4 Habilitiga disertacio pri Esperanto

Jam pli kaj pli ofte okazas, ke oni verkas doktorigajn disertaciojn pri interlingvistikaj au esperanto-rilataj temoj. Por akiri la plej altan universitatan instrurajton ( „facultas docendi" au „venia legendi"), almenau en Germanio kaj kelkaj aliaj europaj shtatoj, oni devas verki post la doktoriga iun *duan* disertacion (kun gravaj novaj ekkonoj) kaj plenumi diversajn kondichojn. Tio estas la t.n. „habilitigho" (kun la titolo *Dr. habil.*, au siatempe en GDR kaj kelkaj aliaj orienteuropaj shtatoj: *Dr.sc.*). En shtate agnoskita universitato habilitighinta doktoro principe povas esti nomumita *docento* au *universitata profesoro*, rajtas ekspertizi doktorigajn kaj habilitigajn disertaciojn kaj ludi esencan rolon en la universitata medio. La anglistino en la Universitato de Leipzig kaj esperantologino, *d-rino Sabine Fiedler*, la 29-an de januaro 1999 sukcese habilitighis per 400-pagha bonega (germanlingva) disertacio kun jena temo: *„Planlingvo kaj frazeologio: Empiriaj esploroj pri reproduktita lingvo-materialo en Esperanto"*. Chi tiu esploro estas aparte grava, char ghi altnivele refutas la ofte audeblajn asertojn, ke Esperanto estas senkultura lingvo, ne povas redoni kulturajn valorojn, ne disponas pri adekvataj esprimiloj k.s. Per la sukcesa fino de la habilitigha procedo shi akiris la „venia legendi" por *„ghenerala lingvistiko/interlingvistiko"*. Inter la kvin

oficialaj ekspertizantoj ankau trovighis *Detlev Blanke*. La disertacio de Sabine Fiedler aperos chi-jare kiel libro. La adreso de Dr. phil. habil. Sabine Fiedler: Am Zollamt 5, DE-04838 Gordemitz, Germanio, sfiedler@rz.unu-leipzig.de

---

## 5 Volapuko ankorau ekzistas

Ankorau ekzistas kelkaj amikoj de Volapuko, kiuj ech eldonas cirkuleron. Oni povas korespondi en Esperanto kun la redaktoro:
Ralph Midgley
24 Staniwell Rise
Scunthorpe
Britio DN17 1TF.

(Represo ellasita.)

---

## 6 Reapero de „Cosmoglotta" — revuo en Interlingue

La lasta eldono de „Cosmoglotta", revuo en Interlingue, estis n-ro 286 (septembro 1985), en la 56-a jaro de la aperado. Multe pli ol jardeko sajnis, ke la periodajho komplete estingighis kaj kun ghi, pli au malpli, ankau la movado por Interlingue. Tamen, jen denove provo, por reaperigi la revuon. Ni salutas la 287-an numeron.

(Represo ellasita.)

---



---

Sendu demandojn au komentojn al Mark Fettes.